



Enkonduko al interlingvistiko

Ahmad Mamduhi

Kun partopreno de prof. Renato Corsetti

La 3-an de nov. 2024

Inter.lingv.ist.ik.o?

La nomo estas mult-signifa!

Ĉu laŭ la diro de Atanas D. Atanasov “la nomo mem ne estas sukcese kreita”?

Kion tia ambigua nomo kaŭzis al la disvolviĝo de la scienco mem? Ĉu positive kaj ampleksige?

Ni vidu ...!

Kvar diversaj signifoj/skaloj de interlingvo

1- ~~Lingvo, kiun uzas komencantoj en fremdlingva lernado~~



2- ~~Interlingva vs. intralingva (vd. postan lumbildon)~~

3- Internacia/komuna lingvo (ĉu etna, ĉu planita/konstruita)

4- Planlingvo

Diversaj signifoj/skaloj de Interlingvistiko

- Intralingvistiko (el la latina 'intra' = ena) – okupiĝas pri esplorado de nur unu lingvo en ĝia kadro, sen ia ajn komparo kun aliaj lingvoj.
- Interlingvistiko (de la latina 'inter') - traktas esploron de homa lingvo ĝenerale, postulante komparadon “inter” diversaj lingvoj.

Ekz-e en: <https://slideplayer.com/slide/13467965/>

Interlingvistiko = komunlingvistiko

Lingvoscienco pri ĉia-specaj lingvoj –
ĉu naturaj/etnaj ĉu
planitaj/konstruitaj – kiuj uziĝis/as
kiel komuna lingvo inter popoloj kun
diversaj lingvoj



<https://www.timeshighereducation.com/student/subjects/what-can-you-do-linguistics-degree>

Interlingvistiko = planlingvistiko


Lingvoscienco pri lingvoj, kiuj planiĝis por esti uzataj kiel komuna lingvo inter popoloj kun diversaj lingvoj

Komunlingvistiko > planlingvistiko

Do, planlingvistiko estas parto aŭ subbranĉo de komunlingvistiko, same kiel:

planligvistiko > esperantologio

t.e. esperantologio estas parto/subbranĉo de planlingvistiko



Naturaj komunlingvoj kontraŭ planitaj komunlingvoj

Naturaj komunlingvoj, kiel:

La latina, la greka, la franca kaj la angla

Planitaj komunlingvoj, kiel:

Balaibalano, Volapuko, Esperanto, kaj Ido



<https://www.linkedin.com/pulse/natural-intelligence-vs-artificial-shahid-reza/>

La estonteco de interlingvistiko

“Interlingvistiko estis origine komprenata kiel scienco pri kreado de internaciaj helplingvoj. Ekde la unua difino de Jules Meysmans el la jaro 1911 oni konstante plilarĝigas ties esplorterenon, inkluzivante praktike ĉion, kio konektiĝas kun lingvo, ekzemple lingvopolitiko, lingvokomparado, lingvoplanado kaj lingvonormigo, multlingveco, piĝinoj kaj kreoloj, ĉiuj iloj de internacia komunikado/interlingvoj, lingvokreado por plezuro ktp. En la tempo de ĝenerala tutmondiĝo, oni povus eĉ esplori la rolon de mondaj anglaj lingvoj.”



Laŭ:

- Věra Barandovská-Frank: Mögliche Szenarien for the future of Interlinguistics (Eblaj tendencoj por la estonteco de interlingvistiko)

Citita el:

IPI 126 p.12 2024:1

5 REVU-NUMEROJ

5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik

Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2023.

ISBN: 978-3-96023-577-4.

La estonteco de interlingvistiko

“En mia kontribuaĵo, mi klopodos rezoni pri kvar el multaj eblaj tendencoj:

1. *English only*: kunfandiĝo de interlingvistiko kaj anglistiko
2. *Interlinguistics as Paleolinguistics*: esploro de interlingvistiko pro historiaj kialoj
3. *Hollywood Interlinguistics*: pristudi lingvojn konstruitajn por fikciaj mondoj k.s. («Gobbotendenco»)
4. *Interlinguistics recycled*: uzi malnovajn planlingvojn por artaj celoj”



Laŭ:

- Věra Barandovská-Frank: Mögliche Szenarien for the future of Interlinguistics (Eblaj tendencoj por la estonteco de interlingvistiko)

Citita el:

IPI 126 p.12 2024:1

5 REVU-NUMEROJ

5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik

Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2023.

ISBN: 978-3-96023-577-4.

Kion ni studos en nia kurso

Kiel Atanas D. Atanasov (1892-1981), bulgara Esperantologo, diris en ĉapitreto “Interlingvistiko” en sia libro “La Lingva Esenco de Esperanto”:

La “principaj fundamentaj demandoj” “antaŭ la reala problem pri kreo de la dezirata IL” estas:

“1- Ĉu ĝenerale tia lingvo estas ebla?

2- Se jes, kia ĝi devas esti, kian strukturon havi, al kiaj postuloj respondi.”¹

1- Atanas D. Atanasov, “La Lingva Esenco de Esperanto”, UEA, 1983, pp. 161-2

Kion ni studos en nia kurso

1- Ĉu ĝenerale tia lingvo estas ebla?

- Multaj filozofoj kaj lingvistoj respondis jese, kiel:

Descartes, Komensky, Leibnitz, Montesquieu, Volney, Voltaire, Nietzsche, Max Muller, Tolstoj, A. Meillet, O. Jespersen, ...

2- Se jes, kia ĝi devas esti, kian strukturon havi, al kiaj postuloj respondi?

- Descartes en sia fama letero en **1629** al sia amiko, Mersenne, prezentis ĝeneralan skizon de tia lingvo: simpla, logika, facila por ĉiuj, afiksa vortfarado – sed li nenion diris pri la leksika konsisto de tia lingvo!
- Estas interese, ke ekz-e Balaibalano (**1580**) 51 jarojn antaŭ la letero de Descartes, preskaŭ havis la samajn ecojn!

Kion ni studos en nia kurso

Iom da komunlingvistiko (do ankaŭ iomete da planlingvistiko kaj esperantologio)

Ni studos nur kelkajn - esence diversajn – planlingvojn, por vidi kiaj ecoj estas pli taŭgaj por ideala planita interlingvo, ekz-e:

- Latina alfabeto, araba alfabeto ... aŭ (tute) nova alfabeto?
- Analiza (izola/izolanta) aŭ sinteza? Se sinteza, fanda aŭ aglutina?
- Strikta (fiksa) aŭ fleksebla (libera) vortordo?
- ...

Kaj ...

Cel-konscia interlingvistiko/kurso

Pri komunlingvistiko, planlingvistiko kaj esperantplogio feliĉe jam ekzistas "sufiĉe/relative" riĉa literaturo (ekzistas universitataj programoj kaj laboraĵoj, revuoj, artikoloj kaj libroj)

Do, nia kurso sekvos pli mallarĝan – kaj espereble pli profundan – sintenon/fokuson, kio estas ...:

Honeste, kiel Esperantistoj, nia celo estas disvastigado de Esperanto; do ĉar nia fina/ĉefa celo estas antaŭenigado de nia lingvo, ni konkludos kiel eblas pli/plej efike agadi por Esperanto surbaze de niaj kurs-rezultoj! Kiel nia anaro pli/plej efike laboru por Esperanto!



 English	 Esperanto
to eat	manĝi
ate	manĝis
meal	manĝo
edible	manĝebla
to feed	manĝigi
to snack	manĝeti
to feast	manĝegi

<https://www.facebook.com/EsperantoF/posts/520635625555489/>

Plej sukcesaj natura kaj artefarita komun-lingvoj: La angla kaj Esperanto

Laŭ la diraĵo “Ĉiuj amas la venkinton!”, ankaŭ ni pli detale studos nur la venkintajn komunlingvojn, t.e. la angla kaj Esperanto.

Jam grandaj lingvistoj tion esprimis, kiel André Martinet (1908-1999), fama franca lingvisto:

“Mia konkludo estas tio, ke la problemo de lingvo por internacia komunikado prezentas sin kiel la konflikton inter planita lingvo, Esperanto, kiu konate funkcias kontentige por ĝiaj uzantoj, kaj hegemonia nacia lingvo, kiu, kiel ni ĉiuj scias, estas, hodiaŭ, la angla.”

“My conclusion is that the problem of a language for international communication presents itself as the conflict between a planned language, Esperanto, which is known to function to the satisfaction of its users, and a hegemonic national language, which, as we all know, is, today, English.”

Martinet, A. (1989). The proof of the pudding ...: Introductory note. In K. Schubert (Ed.), *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages* (pp. 3-5). Berlin & New York: Mouton de Gruyter, 348 pp.

Do, eble nia kurso estas “Pozitiva interlingvistiko”

Same kiel la “pozitiva psikologio” estas akademia disciplino de la fako psikologio, kies precipa celo estas esplori la “bonajn”, “pozitivajn” aspektojn de la komunikado, interrilatado kaj kunvivado inter homoj, nia “pozitiva interlingvistiko” traktas diversajn ecojn kaj faktorojn de la sukcesintaj interlingvoj, t.e. la angla kaj Esperanto por vidi kio plej bone sukcesigas interlingvon!

Plej sukcesaj natura kaj artefarita komunlingvoj: La angla kaj Esperanto

1- La realo montras, ke la plej uzata natura komunlingvo tra la tuta mondo estas la (**fuŝita!**) angla (*broken English*).

2- Laŭ la (anglalingva) verko de **Roberto Garvía Soto** “**Esperanto and its rivals: the struggle for an international language**” (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj: la lukto por internacia lingvo) (2015), Esperanto sendube estas la plej uzata artefarita komunlingvo tra la tuta mondo:

“Inter ĉiuj artefaritaj lingvoj kreitaj inter la lastaj jardekoj de la deknaŭa jarcento kaj la eksplodo de la dua mondmilito, nur Esperanto ankoraŭ estas prosperanta; ĝiaj iamaj rivaloj estas nur fantomoj en la Interreto. Kaj post pli ol 100 jaroj da vizaĝ-al-vizaĝaj interagoj kaj impona literatura korpuso, Esperanto transformiĝis en plenan lingvon, kun sia propraj neregulaĵoj, ambiguaĵoj, esceptoj kaj konvencioj.”

“Among all the artificial languages created between the last decades of the nineteenth century and the outbreak of World War II, only Esperanto is still thriving; its former rivals are only ghosts on the Internet. And after more than 100 years of face-to-face interactions and an impressive literary corpus, Esperanto has been transformed into a full-fledged language, with its own irregularities, ambiguities, exceptions, and conventions.”

Garvía, Roberto, *Esperanto and its Rivals*, University of Pennsylvania Press, Philadelphia, 2015, 227 pp. p. 3.

Kial/kiel la angla kaj Esperanto estas venkintaj?

Lingve

fonetike

gramatike

vortare/leksike

Politike

Socie

Ekonomie

Amaskomunikile

...

Sed, ĉu vere ili venkis?

Nek la angla, nek Esperanto jam estas **tut**monda!

Do, iel ni povas taksi ilin “nevenkintaj”, se ne
“malvenkintaj”!

Kial/kiel la angla kaj Esperanto ne estas tute venkintaj?

Lingve

fonetike

gramatike

vortare/leksike

Politike

Socie

Ekonomie

Amaskomunikile

...


Do, ni serĉos kaj traktos kaj iliajn fortpunktojn kaj iliajn malfortpunktojn

Kio kaŭzis relativan venkon de la angla?

Kio baris la tutan venkon de la angla?

Kio kaŭzis relativan venkon Esperanto?

Kio baris la tutan venkon Esperanto?



https://www.google.com/imgres?imgurl=https%3A%2F%2Fi.imgur.com%2Fbc1ZdCcg.jpg&tbnid=4IlbYzr8asGoDM&vet=12ahUKEwiS2_ysMSDaxWOGv0HHYT_DSMQMygRegQIARBv.i&imgrefurl=https%3A%2F%2Fimgur.com%2Fgallery%2F6wxJrTF&docid=NQIPRTp8CBKJIM&w=728&h=650&q=English%20vs%20Esperanto&hl=eo&authuser=0&ved=2ahUKEwiS2_ysMSDaxWOGv0HHYT_DSMQMygRegQIARBv


Pragmatisma sinteno

Ĉar surbaze de niaj konoj kaj analizoj, ni atingos/elpensos rekomendojn por plia sukcesigo de Esperanto,


do, eble nian aliron aŭ sintenon ni povas nomi pragmatisma kaj pozitivisma.

Parenteze, William James (1842-1910), usona filozofo kaj psikologo, kiu estis por-Esperanta homo¹, fakte kreis la terminon "pragmatismo", kaj reprezentis influan rolon en la disvastigo de pragmatismo.

1- Bv. vidi: "Aventuroj de Pioniro", Edmond Privat, J. Régulo, La Laguna, 1963.




William James (1842-1910)



Libro, en kiu ni legas de Edmond Privat pri James kaj Esperanto

Kelkaj ecoj, kiuj pli karakterizas nian kurson “Malkoloniigado de interlingvistiko”



Nuancoj de Malkoloniigaj Voĉoj en Lingvistiko

“Ĉi tiu libro argumentas ke Lingvistiko estis formita fare de koloniigado. Ĝi skizas kiel lingvaj praktikoj povas esti malkoloniigitaj kaj la defiojn, kiujn tio prezentas al lingvistoj. Ĝi konkludas, ke **malkoloniigado en Lingvistiko estas procezo sen difinita finpunkto kaj ne povas esti tute sukcesa ĝis ankaŭ universitatoj kaj socioj estos malkoloniigitaj.**”

https://www.multilingual-matters.com/page/detail/?K=9781800418523&utm_source=Multilingual+Matters+News&utm_campaign=ce782cc1d0-EMAIL_CAMPAIGN_2023_07_07_09_43&utm_medium=email&utm_term=0_-ce782cc1d0-%5BLIST_EMAIL_ID%5D

Kio estas malkoloniigado?

Malkoloniigado (senkoloniigo aŭ malkoloniigo) estas la nuligo de koloniismo, nome la neegaleca rilato per kiu unu homo, ŝtato aŭ nacio establas kaj konservas dependan teritorion sub alia. Ĝi povas esti komprenita politike (ekhavante sendependecon, sendependan aŭtonomion, union kun la metropolo aŭ alian ŝtaton) aŭ kulture (forigo de malutilegaj koloniaj efikoj).

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Malkoloniigo>




<https://onpolicy.org/why-societies-must-decolonize-critical-questions-surrounding-decolonization/>

Malkoloniigado de (inter)lingvistiko

Ekz-e, kial (nur/ĉefe) “Patro nia” estas menciita/uzita kiel ekzemplo por komparaj lingvistikaj studoj?

Ĉu ne estas pli taŭga la Artikolo 1 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, pro ĝia universaleco kaj neŭtraleco? Aŭ la Artikolo 2, kiu inkluzivas ankaŭ homan rajton pri lingvoj?

(Estas interese, ke ĝisnunaj alternativoj/proponoj estas – denove - la biblia rakonto, pri la Babela turo, aŭ la legendo pri Norda Vento kaj Suno, kiu kvankam ne estas ligita al Kristanismo, tamen estas fare de Ezopo kaj ... okcidenta!)



**Malkoloniigi la
Interretajn Lingvojn**

<https://whoseknowledge.org/initiatives/decolonizing-the-internet/>

Malkoloniigado de interlingvistiko

Kial orientaj planlingvoj ne traktiĝas en interlingvistiko (en senco de planlingvistiko)?

Por specimeno, ni iomete studos **Balaibalanon** - kiu estas (mez)orienta planlingvo de antaŭ 444 jaroj - kaj la interlingvon **Zilengo** de la japano Oka Asajirô, kiu proponis ĝin nur 2 jarojn post la ekesto de Esperanto - kaj influite de ĝi.

Jen kelkaj legaĵoj pri Balaibalano:

- [https://uea.org/vikio/Interlingvistiko_1 - Balaibalan](https://uea.org/vikio/Interlingvistiko_1_-_Balaibalan) (Esperanta traduko de anglalingva artikolo <https://www.iranicaonline.org/articles/balaybalan-language> fare de prof. Renato Corsetti)
- [https://uea.org/vikio/Interlingvistiko_2 - Balaibalan](https://uea.org/vikio/Interlingvistiko_2_-_Balaibalan)
- <https://eo.wikipedia.org/wiki/Balaibalano>

Jen kelkaj legaĵoj pri Zilengo:

- <https://eo.wikipedia.org/wiki/Zilengo>
- http://www.lingviko.net/db/17_Lins.htm



Dankon kaj ĝis la venonta dimanĉo!

توسط - Eeno11 اثر شخصی، CC BY 3.0
<https://commons.wikimedia.org/wiki/index.php?curid=16268557>